Numero kvara. Mardon 9-an de aŭgusto

# Kongresa Sciulo

Kongresa Kuriero de la 107-a Universala Kongreso de Esperanto

## Pli ol 50 homoj ĉeestis la tradician Esperantan diservon!





Pli ol 50 homoj ĉeestis la tradician Esperantan diservon en la katedralo Christ Church. Pastro Joel Amis prezidis, Pastro Hans Becklin predikis. La direktoro de la muziko estis Andreo Sly (estrarano de Kanada Esperanto-Asocio — KEA) kaj kungvidis la kantadon Ĵenja Amis (sekretario de la LKK + estrarano de KEA). Andreo kaj Ĵenja ĉantis gregorie. Al la kantogvidantoj ankaŭ aliĝis s-ro Stryhn Meyer. Vizitu la FB-paĝon de la UK por aŭdi Andreon ludi grandan orgenon! https://www.facebook.com/Montrealo.kongreso

## En la gazetaro

Jam aperis pli ol deko da artikoloj franclingvaj kaj anglalingvaj en la montreala gazetaro, radio kaj televido! Pluraj aliaj intervjuoj estas en la planoj ĉi-semajne. Ni kompilis la liston (kiu eĉ ne estas plena): esperanto2022.ca/eo/pri-ni-gazetaro

## Kleriga lundo

Kleriga lundo estas aranĝo enkondukita dum la UK 2003 en Göteborg kun la celo proponi al kongresanoj informiĝi pri temoj ne nur esperantistaj. Ĉijare do temas pri la jubilea dudeka sesio, kaj la naŭ seminarioj proponataj estis vizitataj de kontentiga nombro da personoj kaj la partopreno estis aktiva. Ĉeestantoj intervenis plurfoje per interesaj konstatoj, eventuale kompletigo de informoj, peto pri pliaj klarigoj. Dankon al ĉiuj gvidantoj — Renée Triolle, Sylvain Lelarge, Kristin Tytgat, Humphrey Tonkin, Javier Alcalde, Katalin Kováts, Thomas Bormann, Raymond Brisebois, Jimmy Stryhn Meyer kaj al la partoprenantaro.
\Michela Lipari

# Esperanta debuto kaj malfermiĝo al la publiko!

Dum la Montreala UK debutas du novaj junaj E-artistoj: Stefano (Étienne Laflamme, Kanado [Kebekio]) kaj Kristina Miroŝkina (Rusio / Kanado [Kebekio]). Ili koncertas laŭ la invito de la LKK, kaj la LKK decidis malfermi ilian koncerton al la ĝenerala publiko. Do, invitu ĉiujn viajn amikojn, parencojn, konatojn kaj ĉiuj kiuj interesiĝas pri Esperanto! La eniro estas senpaga. Ili ludas por vi barokan muzikon de Händel, post-romantikan rusan muzikon kaj ĵazecan muzikon de la 20-a jarcento. La programo inkluzivas pecojn tradukitajn en Esperanto, kaj ankaŭ originalan Esperantan musikon komponitan en la 2021-a jaro de la usona David Gaines. Ĉiuj informoj ĉi tie: https://fb.me/e/2JM4NeflH

# Dividu viajn fotojn!

Ni kreis specialan albumon por ke vi povu dividi kun la organizantoj viajn fotojn kaj videojn: mallonge.net/fotoj2022

# Socia GLAT-renkontiĝo

Estas proponita renkontiĝo de gejoj, lesboj, ambaŭseksemuloj kaj transgenruloj (GLAT) en trinkejo SKY, je 1478, rue Sainte-Catherine Est, angulo kun rue Alexandre-De Sève (inter metrostacioj Beaudry kaj Papineau). Kontaktu Mateon (KN 270), 514 730-0711.

# En la gazetaro

Jam aperis pli ol deko da artikoloj franclingvaj kaj anglalingvaj en la montreala gazetaro, radio kaj televido! Pluraj aliaj intervjuoj estas en la planoj ĉi-semajne. Ni kompilis la liston (kiu eĉ ne estas plena): esperanto2022.ca/eo/pri-ni-gazetaro

*Kongresa Sciulo* estas la kongresa kuriero de la 107-a Universala Kongreso de Esperanto, en Montrealo, Kebekio, Kanado, de la 6-a ĝis la 13-a de aŭgusto de 2022. Redaktas Sylvain Auclair. Redaktejo: ĉambro Milojević, Université du Québec à Montréal, DS-R340. Nova numero aperas ĉiumatene (krom en merkredo). Eblas elŝuti koloran version per apo trovebla je uk2022.glideapp.io. Kontribuojn (tekstojn kaj fotojn) sendu al jrsylvain.auclair (ĉe) gmail.com.

© Universala Esperanto-Asocio, 2022.

Dépots légaux: Bibliothèque nationale du Québec et Bibliothèque nationale du Canada, troisième trimestre, 2022.

# Neformala vegetera kunmanĝado

**Por Veganoj Kaj Vegetaranoj (kaj interesitoj, aŭ simple homoj kiuj ŝatus babili kaj manĝi ion bongustan)**

Marde la 9an de aŭgusto inter 17:30 kaj 19:30, ĉe *Resto(racio) Végo* (1720, strato Saint-Denis), memserva vegana kaj vegetarana restoracio, kiu troviĝas nur kelkajn minutojn piede de la kongresejo.

Ĉiuj estas bonvenaj. Neniu bezono antaŭaverti. Demandoj? Telefonu aŭ mesaĝu al Garry Evans: garryoevans@gmail.com aŭ 514 594-3645.

# Volontuloj bezonatas!

Venu al la LKK-ĉambro por enskribiĝi por volontuli! Ni tre aprezas vian helpon.

/LKK

# GRAVEGE! Nova telefona numero por la vifia pasvorto

Por ricevi vian individual aliron al la interreto, tekstu la vortoj ***worldesperanto*** al tiu ĉi numero: 1-226-546-4653. Se vi ne havas eblon teksti ene de Kanado, vi povas ricevi pasvorton ĉe la informejo. Se ankaŭ tio ne funkcias, estas teknikisto de la universitato en la ĉambro M-900 (nivelo de la metroo) kiu povus helpi.
/LKK

# Malfruoj


**Bonvolu veni akurate al programeroj por ne ĝeni.**

# Merkreda bicikla ekskurso.

Rendevuo je 8:30 ne plu 8:00 ĉe kongresa Informejo. La bicikla luejo malfermiĝas nur je la 9:00 do ne necesas veni tro frue. Vi piediros 15 minutojn por atingi la luejon. Kunportu vian akvobotelon, sunkremon, kaj ion por manĝeti. Vi ricevos sekurkaskon.

# MULTnacia Nacia Vespero

La Nacia Vespero estis pli ol Nacia Vespero- ĝi estis MULT-nacia vespero. Kial multnacia? Ĉar Montrealo estas multnacia urbo, kaj Kebekio estas multnacia provinco, en multnacia lando, Kanado. Do kiam ni planis la Nacian Vesperon, jen staris al ni dilemo: kiel prezenti multnaciecon de nia amata urbo? Tiel ni decidis inviti diversajn artistojn, kiuj montros al vi diversecon etnan, lingvan kaj kulturan.



La vesperon gvidis la prezidanto de la LKK, Normando Fleury, kaj lia edzino Zdravka Metz (kiu interalie respondeculino pri volontuloj kaj ekskursoj). Ili komencis per la indiĝena legendo pri la kreo de la mondo. La unua grupo prezentita estis Buffalo Hat Singers e (Bizon-Ĉapelaj Kantistoj): indiĝenaj drumistoj kaj dancisto, bele vestitaj per tradiciaj indiĝenaj vestaĵoj, kaj kunigitaj de la spirito de kanto kaj la Potenco de la tamburo, por paco, amikeco kaj frateco.

La dua prezento estis s-inoj Lydia Etok kaj Nina Segalowitz, kiuj montris la tradician inuitan gorĝo-kantadon. Ili klarigis, ke temas pri kvazaŭ konkurso inter la du virinoj kiuj kantas (kaj sciu ke ĉiam temas pri du virinoj) – tiu, kiu ridos unue, perdsas la konkurson. Mi estis tre profunde impresita de tiu kantado, kiu sonas kvazaŭ kiel sonoj de alia mondo.



Sekvis la grupo La R'voyure ('La revid') – tradicia folklora grupo fondita fare de 12 junaj dancistoj kaj 4 muzikistoj de malsamaj artaj kaj tradiciaj fonoj en Kebekio. Tiu ĉi ludema projekto rapide alprenis aŭdacan kaj novigan formon. Ekde 2011 la grupo koncertis ĉe pluraj renomaj kebekiaj kaj 6 internaciaj festivaloj tra Eŭropo.

Sekvis tradicia irlanda kaj skota muziko – inkluzive de sakfluto, prezentita de la grupo Jones the Pipes.



La vesperon finis 40-minuta prezento de la grupo Oktoecho [oktoeko]. Kaj ho, kia prezento ĝi estis! La tuta teatro ekstaris fine por aplaŭdegi tiun ĉi mirindan grupon. Fondita en Montrealo en 2001, Oktoeko miksas muzikon de Okcidenta Azio kun indiĝenaj muzikoj el Ameriko kaj tiel ĝi kreas originalajn kebekiajn verkojn, unuigante kaj kunfandiĝante malsamajn tradiciojn, kiuj trapasas ĉiujn limojn. Imagu miksaĵon de inuita gorĝ-kantado kun la danco de turno-dervîŝo, indiĝenaj drumoj, klavaro kaj mandolino. Malfacilas, ĉu ne? Sed tia ĝi estas, same kiel Montrealo, ĝi estas kunfandiĝo de diversaj etnoj, kulturoj kaj tradicioj, kiuj miksiĝas, kunfandiĝas kaj kreas ion mirindan. Ni esperas ke ĉiuj partoprenantoj ĝuis la MULTnacian Nacian Vesperon kaj la MULTnacian belan Montrealon! Iru al la fejsbuka paĝo de la Montreala UK por vidi diversajn pecojn de la MULTnacia Nacia Vespero: https://www.facebook.com/Montrealo.kongreso



/Ĵenja Amis

## IJEA – UIAE / Juristoj – Advokatoj

Estas eraro en la programero de mardo, la 9-a, en la salono *Hodler*. Fakte okazos tie inter 14:45 kaj 16:15 ne nur asemblea kunsido de UIAE (Unio Internacia de Advokatoj Esperantlingvaj), sed du asembleaj kunsidoj sinsekvaj, ĉiu de 45 minutoj, la unua de IJEA (Internacia Jurista Esperanto-Asocio) kaj la dua de UIAE.

La tagordo de tiu de IJEA jenas:

1. Ekzamenado de kontoj por aprobo.
2. Elekto de nova estraro.
3. Prelego pri kanadaj indiĝenaj popoloj.

La tagordo de tiu de UIAE jenas:

1. Kialo de estigo de UIAE, laŭplane apud IJEA kun proksima interrilatiĝo.
2. Diskutado de projekto de statuto por fondado de UIAE.
3. Elekto de unua estraro.
4. Strategiaj linioj por la estonto

Ĉiuj ĉeestantoj de IJEA a.k. rajtos ekhavi senpage ekzempleron de la ĵus aperinta lasta revuo de IJEA kaj antaŭaj.

Advokatoj ĉeestantaj en la UK estas tre bonvene incitataj al partopreno en la a.k. de UIAE sendepende de aniĝo, senpaga (kotizo ne estas deviga) same kiel de aneco.

Unu el la ĉefaj celoj de UIAE estas la videbligo de Esperanto kiel utiligilo en la medio de neesperantlingvaj advokatoj.

Miguel FARIA DE BASTOS
Prezidanto de IJEA kaj kunordiganto de UIAE

**Hodiaŭ:** 21°, iom da nuboj

**Vespere:** 18°, nuba

**Nokte:** 16°, iom da nuboj

**Morgaŭ:** 25°, suna.

# Ŝanĝoj al la programo

**IKEL (Etnistoj): ne marde, sed vendrede**

Estas ŝanĝo en la programo: la kunveno de IKEL okazos ne mardon en salono *Beauchemin* (kiel indikite sur la papera kongreslibro), sed vendredon inter 13:30 kaj 14:15 en salono *Nanofszky*. Temos pri prelego de D-ro Mark Fettes: Indiĝenaj rajtoj kaj ekologia justeco. Perspektivoj el daŭrantaj luktoj ĉe la Pacifika Marbordo de Kanado. Tiu prelego estos malfermita al ĉiuj.

/Alain Favre

**MONA: nuligita**

Pro foresto de multaj aktivuloj de MONA, la fizika kunveno estas nuligita, sed samtempe (mardon, 11:45 en Montrealo, 15:45 UTC) okazos reta kunveno (Zoom-adreso 871 0994 7502 kaj la pasvorto estas la nomo de nia kara kaj komuna lingvo per minusklaj literoj) kie oni povos aŭskulti pri MONA-agado dum la jaro

/Keyhan Sayadpour

## Aktualigita programo por mardo, ĉambro *Saint-Martin*

9-9:45 Paroligaj lecionoj M3

10-10:45 Paroligaj lecionoj M3

11-11:45 Aŭtora duonhoro 3

12-12:45 Aŭtora duonhoro 4

13-14:30 Bobelarto 2: INK-gajnintoj

14:45-15:15: Bobelarto 3: Honoraj Komitatanoj

15:30-16:30 Bobelarto 5: Verksesio

**Ĵaŭdon, la 11an de aŭgusto, ĉambro *Saint-Martin***

13-14 Bobelarto 4: Legosalono

\LKK

# Tuttagaj eksursoj

Restas biletoj por du ekskursoj:

E1 — Laŭ la Riverego (vizito de Tririveroj)

E3 — Ĉefurbo de Kanado (vizito de Otavo).

Aĉetu hodiaŭ ĉe akceptejo.